nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2017

## LA ĈIJARA KURSO, EN OFICIALA LERNEJO PRI LINGVOJ

Kiel ni informis en pasintaj monatoj, oni faris demarŝojn ĉe la Oficiala Lingvolernejo de Fuenlabrada, por instrui Esperanton tie. Fine, la estraro de la lernejo akceptis nian proponon, kaj permesos tiun instruadon, se oni atingas sufiĉan nombron da lernantoj.

La plano estas ke la klasoj okazos ĉiusemajne, la mardojn inter la 17:00 kaj la 18:30 horo, kaj estos gvidataj de skipo de instruistoj. Ili komenciĝos la 31-an de oktobro.

Estas tre grave anonciĝi kiom eble plej rapide, por organiziĝi kaj informi la Lernejon, ĉar oni bezonas minimumon. Interesiĝantoj, bv. skribi al adreso madrid@esperanto.es. Krome, bv diskonigi al viaj konatoj kiuj povas interesiĝi, kaj anoncu vin por kunlabori en la disvastigo.

## KREITA LA LKK DE LA VENONTJARAJ KONGRESOJ

Ni jam komencis la preparlaborojn de la kongresoj kiuj okazos en Madrido en julio 2018, nome la 77a Hispana Kongreso de Esperanto (20-22 de julio) kaj la kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (21-28-a de julio)



Dum la komenco de septembro venis al Madrido la respondeculo pri kongresoj de ILEI, Radojica Petrović, kiu kunvenis kun madridaj esperantistoj. Kiel unua resulto, oni kreis la Lokan Kongresan Komitaton (LKK):

* Prezidanto: Manuel Parra

* Sekretario: Santos Olán

* Kasisto: Ricardo Biurrun

* Voĉdonanto (programo): Félix Jiménez

* Voĉdonanto (organizado, gastigado): Águeda Biurrun

* Voĉdonanto (informado, instituciaj rilatoj): José Antonio del Barrio.

Oni vizitis ankaŭ instalaĵojn, gastejojn, kaj oni interparolis kun respondeculo de la institucio pri kongresoj de la madrida urbestraro. Ankaŭ okazis kunvenoj kun aliaj aktivuloj i.a. por plani la junularan programon de la kongresoj.

Ĉar restas multaj taskoj, oni plu invitas volontulojn sin anonci por kunlabori en la organizado. Tre baldaŭ disponeblos la aliĝilo, kaj aliaj necesaj informoj pri la eventoj.

## DU PRELEGOJ EN SEPTEMBRO



La lundon 4-an de septembro, Radojica Petrović prelegis pri ILEI, en la sidejo de MEL.

La 20-an de septembro oni kunmemoris la forpason de la grava esperantista pioniro Émile Boirac, unua prezidanto de la Akademio de Esperanto. Lia pranepino Cathy Boirac loĝas en la madrida regiono, kaj ni invitis ŝin veni al la sidejo, la lundon 25-an

por paroli pri sia praavo. Ŝi rakontis tre interesajn informojn pri li, ne nur pri lia vivo, sed ankaŭ liaj verkoj kaj esploroj pri filozofio, psikologio, parapsikologio, kultura organizado, ktp.

## KURSOJ DUM LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ




Kiel ĉiujare, la 26-an de septembro estis kunmemorita la Eŭropa Tago de Lingvoj, lanĉita de la Konsilio de Eŭropo. En tiu ĉi jaro en Madrido oni organizis tutan semajnon, laŭ iniciato de la asocio de naciaj lingvaj kaj kulturaj eksterlandaj institutoj (EUNIC).

En unu el ili, Esperanto havis rolon: la 29an de septembro, en la sidejo de la Germana Goethe-Instituto, Félix Jiménez gvidis plurajn 25-minutajn mikrokursojn, ĉiun duonhoron, dum kiuj li konigis la bazon de la lingvo, kaj profitis la okazon por disdoni alian materialon kaj ĝenerale kontentigi la scivolemon de la interesatoj.

## KUNVOKO POR OKTOBRO

Omaĝe al la elstara poetino Marjorie Boulton, kiu forpasis antaŭ unu monato, ni planas organizi poezian rondon la 23-an de oktobro, je la 7-a vespere, en kiu ni legos ŝiajn poemojn kaj parolos pri ŝiaj verko kaj vivo.

## VIZITOS NIN

La 4-an kaj 5-an de oktobro troviĝos en Madrido la konata esperantisto, vickonsulo de la Esperanta Civito, Giorgio Silfer. Li pretas rendevui kun lokaj esperantistoj la 4an de oktobro iam ajn post la 18h00, prefere apud Puerta del Sol. Interesatoj bv. kontakti rekte kun li ĉe la adreso: vickonsulo@esperantio.net.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Atentu ke eble la 2-an oni ne povos malfermi pro neĉeesto de la prezidanto; notu supre la kunvokon por la 23-a de oktobro.

La kutima sabata babilado okazos la 7-an de oktobro, en la kafejo Café Madrid, en la strato Mesón de Paños, 6 (tiu estas centra strato, kiu iras el Ópera al la placo Mayor), je la 18,00.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com